

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.



**Pri onta kongreso
plu en Berio,
(p.3)**

**sub la signo de
Georg' Sand',
skandala virino**

...

**Kiu kongresos
Berie,
tiu aprezos
ebrie.^z**



...
**kiu bruligis
ideojn,
virojn,
eĉ tabakon !**

(p.5)

Ĉatoruso, Indrio (Châteauroux, Indre) ĉefa urbo de Basa Berio (Bas-Berry).
Placo de la Respubliko

Legindaj Legendoj Marvirineto

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

La marvirineto¹ naskiĝis en la 19a jarcento, en la menso de fama dana verkisto. Ŝi kreskis en imago kun siaj fratinoj, feliĉa kaj bela, funde de la salitaj akvoj en la palaco de sia patro, la Reĝo de la maroj. Dekkvinjara², ŝi ricevis la permeson naĝi al la surfaco por rigardi la homan mondon. Ŝi renkontis ŝipon sur kiu troviĝis bela princo ŝiaaĝa³, de la homa speco, kompreneble. Tempesto okazis, la ŝipo pereis sed la marvirineto kaptis la princon kaj portis lin nekonscian sur la marbordon. La marvirineto ekamis la princon, kiu vekiginte, ekamis alian virinon kredante ami sian savintinon. La homaj aferoj estas ĉiam tre komplikaj, eĉ pli kiam ili intermiksiĝas kun la sirenaj. Oni ofte amas personon amantan trian personon. Tial, la verkistoj povas verki admirindajn romanojn, operojn, ĉefverkojn, dramojn. Amo de submara al surtera loĝanto ne eblas.

Nia virineto mara estis do tre amara. Ĉu fuŝe fiŝa? Ŝi devis rezignacie akcepti sian sorton, kiel ĉiu el ni, kaj vivi en la korpo, kiun donis al ŝi la naturo. Ŝi devis vivi plu, preni sur sin kaj perlabori sian vivon, longe kotizi al la emerit-kaso⁴, unuvorte⁵ fariĝi respondeca plenkreskulo⁶.

Tamen, la memorajo de la princo okupis ŝian penson. Ŝi kredis, ke la homa mondo certe estas pli bona kaj bela. Fundo de oceano estas iel monotona por junulino avida renkonti la mondon kaj plie la konversacioj kun la fiŝaj kunloĝantoj estis tre limigitaj. Certe, ne estas entuziasmege vivi tute nuda en la malvarma Baltiko.

Ŝi iam naĝis al la patrolando⁷ de sia kreinto kaj klopodis trovi okupon. Ŝi bonŝance obtenis postenon en la dana ĉefurbo. Ŝi nun profesie rigardas⁸ la enirejon de la haveno kaj bonvenigas


la vizitantojn. Mi turiste veturis surŝipe kun bando da esperantistoj (ni ja esperis pli brilan sunon), kiam mi ekvidis ŝin, belan, sveltan, gracian, facile sidantan sur ronda roko. Bedaŭrinde, ŝi turnis al ni la dorson kaj rigardis la surbordajn⁹ turistojn, kiuj rigardis ŝin kun brakoj levitaj, per la ekranetoj de la fotaparatoj. Eĉ marvirineto rajtas esti iom elmontriĝema¹⁰, ĉu ne? Ŝi estas la loka stelulino¹¹. Ve! Nia ŝipeto iris plu. La virineton, mi poste kontemplis hejme kaj detale sur la ekrano de mia komputilo kun ia nostalgio pri iama juneco, ktp... Tie, en la haveno, mi, ni, tute ne interesis ŝin. Ŝi restis kvazaŭ el bronzo!



Klod

Notoj:

1	Virino kun fiŝa vosto, vivanta en la maro. (Sin.: sireno)
2	Kiu havas dek kvin jarojn.
3	Kiu havas la saman aĝon kiel ŝi.
4	Kaso al kiu ĉiu kotizas por ricevi pension post multaj jaroj.
5	per unu vorto aŭ malmultaj vortoj.
6	Ulo, kiu plene kreskis (sin.: adolto).
7	Lando de siaj patroj kaj prapatroj (Sin.: Patrio, patrujo).
8	Zorgas, ke nenio malbona okazu.
9	Kiuj staris sur la bordo.
10	Kiu ŝatas, ke oni rigardas ŝin.
11	Ŝi estas la ĉefa rolanto. Oni admiras ŝin. (Sin.: stelo)



Plu en la felietono... Ĉu la onta SAT-Am-kongreso plu estos Beria ?

Kiel anoncote en La Sago 75, ni devis rezigni pri Burĵo kiel kongres-urbo.

Intertempe, mi turismis al Aosta Valo, ne nur por aŭdi per miaj propraj oreloj, ĉu vere la Aostvalanoj scipovas - eĉ minimume scipovetas - la francan, sed plie por pristudi eventualan eblecon kongresi tie, ne nepre en Aosto mem.

Plezure, mi konstatis ke (krom *nur* unu fojo) oni pozitive respondis al mia demando «*Parlez vous français ?*» ne nur en komercejoj aŭ turismejoj - kio aspektas kvazaŭ sensurprize - sed eĉ de stratlaboristoj kaj de olda kamparanino, duonsiestanta sur eksterdoma benko.

Malpli plezure, mi konstatis ke neniuj strukturoj sufiĉe ampleksa por eĉ malgranda kongreso prezentiĝis, sen konsidero pri prezoj. Mi tiom pli bedaŭris, ke ege ege belas la regiono, kaj riĉas je multaj kulturaj. Plie mi malkovris ke ĝi eĉ produktas vinon kaj fromaĝon tute indajn. Mi neniam estis membro de l' «fan-klubo» de Degol (*Charles de Gaulle*), sed eksciante ke li maltrafis okazon francigi Aostvalon, li ne kreskas en mia estimo: ja tute ŝovinisme kaj naciisme, jen regiono kiu meritis esti franca !

Ŝajnas tamen ke la dulingveco de la Aostvalanoj ne instigas ilin al uzo de Esperanto... Vidu ĉi apude, En Aosto, Esperanto aperas kiel senelireja vojo, eĉ privata, kie oni ne rajtas restadi....

Nu, intertempe ĉe la horizonto aperas ebleco kongresi en Ĉatoruso (Châteauroux), la alia poluso de Berio (Berry). Gvatu la evoluon de ĉi felietono !

SAT-Amikaro, la asocio kiu scias konservi varma la suspenson !

Nome de la komitato, Serĝo



Enhavo

SAT-Amikaro	
Onta kongreso	1/3
SAT Kongreso en Sarajevo	16
Analizoj/opinioj	
Pri komunikado, instruado, lernado	4
Komparo inter du planlingvoj	10
Litio/Afganio	12
Lingvo	
Legindaj legendoj	2
Kiel esperantigi 14	7/8
Libro-servo	8
Recenzoj	
Libro vivas pli longe ...	11
El nia leterkesto	
Kompletigo pri Konsilio de Eŭ.	6
Pri esperantigo	8/9
Pri Esperanta mapo	9
Pri «Atuto KER»	9
Kontribuo al Vikipedio G. Sand'	1,5/6
Humuraĵoj-distraĵoj	
BD: La tribuloj	2
Flore kuku	4
HuMorelaj Linioj	14
Selle-humuraĵoj	4,6,10
Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement	
Fariĝu ambasadoro...	13
Gasanga festo	14
Un espérantiste cubain..., San-Tulo, Parizo	15

GRAVA ATENTIGO

Cele al interna renovigo de la sidejo de SAT (ĉe avenuo Gambetta, en la 20a kvartalo), la pariza SAT-rondo organizas «kribrad-semajnon» de la 10a ĝis la 14 de oktobro, evidente en la sidejo mem.

La tasko konsistas en kribrado de ĉio ajn nun troviĝanta en la sidejo, por ĝenerala senbalastigo kaj reorganizado. Jam tri personoj planas ĉeesti.

Ĉiuj SAT-amikoj pretaj partopreni tiun agon sin anoncu, ĉu rete <sekretario@sat-amikaro.org>, ĉu poŝte, ĉu telefone al la sidejo de SAT-Amikaro.

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo. **Enpaŝiganto**: Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo**: Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de**: Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos, Lino Markovo.

Partoprenis en ĉi numero: Andreo Andrio, Louis Gohin, José Grammatico, Mirejo Grosjean, Fabris' Kare, Klod, Petro Levi, Flora Markov, Lin' Morel, Hasano Ntahonsigaye, Ĵak Le Puil, Serĝo Sir'.

Partoprenis en la antaŭa numero, kaj kiun mi forgesis citi: Louis Gohin, **nia fidela kontribuanto, kiu ricevu mian pardonpeton ! (NDLK: Noto De La Koboldo/ Kolofonisto...)**

Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : lasago@free.fr

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto



El la SAT-movado



Gvidrezolucio

La 84-a Kongreso de SAT kunvenanta en Sarajevo inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 2011,

- instigas la SAT-anojn raporti pri okazajoj en sia regiono kiel faris SAT-ano el Japanio pri la katastrofo en Fukuŝimo,

- plu instigas la membrojn al jarkomenca pago de la kotizo kaj al plej efika varbado de novaj membroj,

- invitas la Plenum-Komitaton organizi malfermitan konkurson por krei novajn varbilojn kiuj plej taŭge prezentu SAT kaj ĝiajn celojn,

- instigas ĉiujn SAT-anojn organizi SAT-kunvenojn dum ĉiuj landaj, regionaj aŭ fakaj kongresoj en kiuj ili partoprenos,

- instigas ellabori tekston por respondi en la retejo al la plej oftaj demandoj pri kio estas SAT, ĝiaj celoj kaj agadoj,

- bonvenigas la proponon krei artan fakon por efikigi la jam komencitan laboron de nunaj muzikistaj kaj artemaj SAT-anoj,

- refoje konstatas la efikan laboron de la Eldona Fakoj Kooperativa notinde pri la nun preskaŭ preta

dokumentfilmo titolita Esperanto, plu instigas SAT-anojn mem partopreni en ĝia vivo. Ĉiu SAT-rondo klopodu organizi minimume unu publikan projekcion de la filmo, kaj laŭeble helpu la projekton per antaŭmendoj ĝis ĝia definitiva apero DVD-forme (espereble jarfine),

- proponas ke ĉiujare parto de la profito de SAT estu dediĉota al eldonoj per aparta kontero « Eldona Fonduso », provizore per EFK,

- invitas ĉiujn kamaradojn pli kontribui al Sennaciulo kaj al Sennacieca Revuo,

- plu instigas la kamaradojn kontribui al la SAT-retejo per sendado de materialo al ĝia respondeculo,

- invitas la Plenum-Komitaton daŭrigi kunlaboron kun IFEF,

- petas la Plenum-Komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso la materialaj kongreskondiĉoj estu SAT-ecaj kaj la turismajoj klerigaj.

www.satesperanto.org

Alvenis ĉe Vinilkosmo: REVADO, la duobla albumo de Rêverie

!



La itala bando el Milano Rêverie ĵus eldonis la unuan duoblan albumon de progresiva muziko en esperanto/itala «Revado»

Unu disko por esperanto kaj unu disko por la itala.

La KD duobla albumo disponeblas ĉe la diskoservo ekde la 15a de julio 2011 ĉe <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd107&lng=e>

kaj jam eblas malkovri Revado-n en la elŝutservoj de Vinilkosmo

laŭ MP3 kaj ogg formatoj ĉe http://www.vinilkosmo-mp3.com/reverie-c-76_177.html

kaj laŭ FLAC senperda formato ĉe <http://cd1d.com/fr/artist/reverie>